



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

SUR VOJO DE SUKCESO...

Kiam ni anoncis la XVII Kongreson, ni iom timis pri ĝia sukceso ne nur pro tio, ke en Ripoll estas malmultaj esperantistoj sed ankaŭ pro la manko de entuziasmo ĉe diversaj esperantistaj medioj, kiuj pro la supersuto de politikaj bataloj kaj problemoj lasis duavice aŭ tute flanke la altajn interesojn de la batalo por lingvo internacia. Kvankam ni travivas kaj certe por longa tempo ankoraŭ epizodojn, kiuj tuŝas profunde la animon de nia lando, sur kies historiaj paĝoj havos eksterordinaran reliefon la nuna epoko, la Kataluna Esperanto-Kongreso prenas sian lokon en la programo de ĉiu esperantista rondo kaj tio rajtigas nin aserti, ke ni estas sur vojo de sukceso.

Tiu sukceso havos sian plej altan elmontron en Ripoll dum Pentekosto kaj sian plej praktikan rezulton en la radikoj, kiujn disetendas K. E. F. sur la kataluna kampo. De diversaj flankoj venas al ni novaj instigoj kaj kuraĝigaj vortoj: ne haltu en la batalo por la unuigo!, kaj tiu batalo ne haltas kaj novaj grupoj staros apud K. E. F. post kelka tempo.

* * *

La batalo por idealo, tio estas ja nia tasko, postulas oferojn kaj sindonemon. Tio estas la kaŭzo, ke al niaj vicoj venas tiom malmulte da homoj. Kio estas idealo hodiaŭ, morgaŭ estos

realaĵo kaj tiam oni konstatos, ke tiu oferado kaj sindonado de la propaganda periodo havis grandan profitan flankon por la estonto. Se ni volas meti esperanton je la servo de la komerco, de la turismo, de la radio, k. t. p., se ni volas doni al la homoj duan lingvon por forigi la superregon de fremda lingvo, tio povas esti, kaj sendube estas, tasko de idealistoj, sed ni konstatu, ke tiaj idealistoj laboras ja por praktika celo.

Dum la mondo ne komprenos la altan kulturvaloron de esperanto kaj ĝian praktikan utilecon, ni devos daŭrigi nian sindonemon kaj oferadon. Ni ne haltos ĉar ni iras sur vojo de sukceso...

POLIGLOTISME I POLIGLOTITIS

Temíem l'efecte que ens havia de fer de sentir parlar el Comte Keyserling. Però l'ocasió fou tan compellidora que hi accedírem. Havíem llegit i sentit dir que s'expressava tan bé en castellà, perquè havia voltat per les Amèriques hispàniques. Però això no ens acabava de llevar les sospites. La fama és que el comte germànic, que tan sovint ens ve a dir les seves opinions, és un gran políglota, parla bé moltes llengües, però ja sabem, temps ha, què vol dir poliglotisme actiu, àdhuc en casos excepcionals. I, efectivament, Keyserling s'expressa en un castellà que fa pena, que ofèn tota oïda mitjanament educada en fonètica de Saragossa o de Sevilla, de Buenos Aires o de Madrid. L'oratória castellana del «Comte de la saviesa» és fonèticament d'allò més tudesca, amb lèxic d'allò més deficient i miserable, amb sintaxi lamentablement bàrbara: *rendirse cuenta per darse cuenta*, n'és un engruna de construcció francesa, *se rendre compte*, amb mots castellans pronunciat germànicament. José Ortega Gasset ha dit, molt encertadament, que fa imbècil de produir-se en un idioma que no sigui el propi. Nosaltres havem experimentat tants cops i tan de prop aqueixa imbecilitat, que voldríem donar-ne entenent al nostre poble, perquè és dels més afectats d'aquesta malura. No serà mai prou divulgat a Catalunya que Sant Vicenç Ferrer, aconseguí anomenada i dignitat universals predicant arreu en el propi idioma. L'ús actiu d'un idioma altre que el propi, amb sentit comú, segons exemple dels anglesos, no pot ésser sinó cas de força major. I havem de maldar aferrissadament per

tal de refer el sentit comú lingüístic a casa nostra, puix que som un dels pobles que més l'hem perdut, pel règim d'ocupació lingüística forastera a què estem sotmesos d'ençà de tant temps. I poc en traurem que el règim legal se'ns canviï, si no ens normalitzem d'inclinació personal en qüestió de llenguatge.

El nostre poliglòtisme és ridículament esquifit i barroer: en comptes de comprendre bé de vista i d'oïda vuit o deu idiomes forasters només n'entenem tres o quatre de malament; en comptes de parlar i escriure bé en l'idioma propi, volem presumir de parlar-ne d'altres, sense hebre esment de la imbecilitat amb què ho fem, ultra la negligència i el confusio-nisme que aquest fet sol comportar envers l'idioma propi. Parlar altrament que en la nostra manera nacional, és cosa que solament havem de fer, amb sentit comú, en un cas de força major, excepcionalment, com ens ensenya un anglès o un andalús. En canvi, parlar bé, castissament en català, és cosa que havem de fer sempre i arreu, com Sant Vicenç Ferrer, per laics que siguem, i com més laics i més normals, més ha-rem d'actuar catalanament els catalans.

L'ideal lingüístico-pedagògic, no pot ésser universalment altre que parlar amb màxima dignitat en la llengua pròpia i comprendre tothom, sense que ningú hagi de renunciar a aqueixa dignitat.

Mentre ací només puguem comprendre francès, espanyol, italià i portugués, hauríem de renunciar a fer venir ningú, per diners que necessiti, que no fos nacional d'aquests idiomes. Totes les persones de sensibilitat i sentit comú haurien preferit de sentir glossar els mateixos temes que ha tractat el Comte Keyserling, per Estelrich, Gaziel, Riba, Carner, Soldevila, Pu-jols, Segarra, Puig i Ferreter, Serra Húnter, Humbert Torres, Unamuno, J. Ortega i Gasset, i dotzenes d'altres mentalitats franceses, italianes i portugueses, val a dir, de llengües que gairebé tots comprenem, i que totes elles ho haguessin fet en els respectius idiomes. En canvi, ara pot semblar que tota la setmana de la intel·ligència ha tingut per efecte màxim la pràctica del poliglòtisme actiu sempre deturpador; — perquè no resulta pas evident que cadascú dels participants s'hi hagi produït en la llengua pròpia. No havem de seguir el mal exemple de Lerroux, qui, a la Lliga de Nacions, es va expressar en francès, va renegar de l'idioma propi, tot i ésser un dels que més representants té a l'organisme internacional de Ginebra. Lerroux no va ésser gaire conseqüent amb el sen-

tit comú lingüístic dels andalusos. Una vanitat ben minsa li va fer donar un exemple ben poc edificant, ben poc moral, ben poc gallard.

Hauríem de començar de saber seguir normes de dignitat lingüística, que la nostra parla, llatina com tantes, ens facilita d'adoptar: rebre amb tota gentilesa, totes les visites expres-sant-nos en català, comprenent-les totes en l'idioma de ca-dascú, però no cuitar servilment a parlar de manera aliena, sovint ben innecessàriament. Si el Comte Keyserling, posem per cas, no comprèn el català, és que no vol, és que vol fer servir els catalans de fonògraf castellà, per tal de practicar ell un idioma que utilitàriament avui li sembla que li convé, per tal d'oferir-hi conferències que li procurin un ingrés ma-terial que descobreix a Catalunya, poble per conquerir, que tothom voldrà conquerir, si no cuitem a reconquerir nosaltres,

DELFI DALMAU



KONGRESAJ INFORMOI

La 24-an de marto la Organiza Kongreskomitato, interkonsente kun la reprezentantoj de K. E. F., fiksas la programon de la Kongreso kaj solvis diversajn punktojn pri organizo kaj aranĝo de la diversaj kunvenoj.

Ni petas ĉiujn grupojn, kiuj eldonas Bultenon, ke ili represigu la programon kaj faru propagandon por la XVII Kataluna Esperanto-Kongreso. Specialan rimarkon ni faras pri la festeno kaj ekskurso al Font Romeu, por kiuj oni devas sin anonci antaŭ la Kongreso al «XVVII Congrès Esperantista Català -- Ripoll». La pagon de la menditaj biletoj oni faros post la Malferma Kunsido. Rimarkinde, ke oni ne bezonas pasporton por la ekskurso al la franca Katalunujo. La partoprenantoj de la ekskurso povos reveturi al Barcelono la saman tagon.

Kongresprogramo

Unua tago, 9-an de junio

- Je la 9-a: Alveno de la kongresanoj kaj oficiala akcepto ĉe la Urbdomo.
- Je la 9^{1/2}: Malfermo de la Kongreso, festparolado de la prezidanto de K. E. F. kaj salutado de la delegitoj en la sama loko.
- Je la 11-a: Solenaj Flörāj Ludoj en la Kazino.
- Je la 14-a: Oficiala Festeno en Hotelo Canaulas (Plaça Nova). Bileto 12 ptoj.
- Je la 17-a: Malfermo de Esperanto-Ekspozicio ĉe la Urbdomo.
- Je la 18-a: Labora Kunsido ĉe la Urbdomo; raporto de la sekretario, de la kasisto, prezentitaj proponoj, k. t. p.
- Je la 22-a: Granda Festo de Orfeo Ripollès en Saló Comtal, kiu ludos la katalunan lirikan verkon *Don Joan de Serrallonga*. Speciala prezo al kongresanoj.

Dua tago, 10-an de junio

- Je la 9^{1/2}: Vizito al Biblioteko Mata, Folkloro Muzeo kaj al la fama Monaĥejo.
- Je la 11-a: Labora kaj ferma Kunsidoj.
- Je la 13-a: Vizito al kooperativo L'Econòmica kaj lunĉo.
- Je la 17-a: Teatra festo en Saló Comtal kun koncerto de Orfeo de Ripoll kaj partopreno de Esbart de Dansaires.
- Je la 22-a: Amuza kunveno en Hotelo Canaulas kun surprizoj.

Tria tago, 11-an de junio

- Je la 6-a: Ekskurso al Cerdanya tra Coll de Toses, Puigcerdà, Burgmadama, Ix, Pla de Sta. Llogaia, Sallagosa, Coll Rigat (belega rigardejo sur Cerdanya), Coll de la Perxa, Bolquera, Odelló, Grand Hotel Font-Romeu, Ermatatge i Calvari (alia rigardejo sur Cerdanya), kaj Montlluís. Oni revenos tra la belega ŝoseo de La Foret, Coll de la Perxa, Odelló, Caos kaj Les Bulloses.
- Prezo de la aŭtomobilbileto 10 ptoj. ĉe la reveno, adiaŭado.

Certe la katalunaj esperantistoj legos kun plezuro la allogan programon en kiu oni trafe kunmetis la amuzajn flankojn apud la labora tasko de la Kongreso.

Nia junia numero havigos al vi ceterajn detalojn kaj precipe tiujn pri vagonaroj, kiujn ni ne povas doni hodiaŭ pro anoncita ŝanĝo en la hortabelo de Kompanio Nordo.

Por la sukceso de la XVII ĉiuj katalunaj esperantistoj veturu al la fama Ripoll!

XVI.^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Lastaj verkoj ricevitaj

27. Tri poemoj de Wordsworth. — 28. Abiturientino. — 29. Amo, vi ĉielregino, estu nia amikino. — 30. Eĉ malsaĝulon, sperto instruos. — 31. Vajszlo. — 32. Pri neagemeco. — 33. Pri la malvigleco. — 34. Maria ŝot. — 35. Homoj en milito. — 36. Grava kazo. — 37. La nova vorto. — 38. Dudek pengoj. — 39. The Pied Piper of Hamelin. — 40. Rakonto de Israel Zangwill. — 41. Prudenta vivado. — 42. Vivo devoj. — 43. Pentofaro. — 44. Vera amo. — 45. Vivo, morto kaj amo. — 46. Penseroj sur papero. — 47. Renkonto. — 48. La lunhomo. — 49. Ses prozaĵoj. — 50. Renkonto. — 51. Nojvara bondeziro. — 52. La edziĝontoj. — 53. Sopira letero. — 54. Animo mia. — 55. Naskiĝis la Majstro! — 56. Silente... — 57. Du flankoj. — 58. La kiso. — 59. Ami estas... — 60. Taglibro de ŝia unua amo. — 61. La sekreto. — 62. Ho, vi, bonedukatulo!... — 63. Pesimismo. — 64. Mi volus... 65. Se Esperanto... — 66. Jazbandsono... — 67. La bonedukita homo. — 68. Ses ŝercversaĵoj. — 69. La senviva domo. — 70. Knabino kaj birdeto. — 71. Porcelana idilio. — 72. Ĉu kulpo aŭ sorto. — 73. La ĉina juĝo kun torturoj. — 74. Homoj kaj laboroj. — 75. Tra mia koro. — 76. Nokta preĝo. — 77. En malbona humoro. — 78. Sapiro al Hispanujo. — 79. La Kolombo. — 80. Invito. — 81. Amo. — Sapiro. — 82. Somera nokto. — 83. Stelo de nia espero. — 84. Strata obstrukco. — 85. Alfredo, virinevitulo. — 86. La fidelaj geedzoj. — 87. Ĉu memoras vi...? — 88. Libero. — 89. Mia amo. — 90. Utopio. — 91. La Kataluna Nacio. — 92. Ho kiel estus dolĉe! — 93. Himna kanto al la amo. — 94. La am' de mia Kor'... — 95. Mia sent'. — 96. Ha! ha! Pro la amo!! — 97. La ekesto de la Amo. — 98. Pli da amo kaj komprenemo. — 99. La profetino de Konnerereuth. — 100. Amo al Dio nekonata. — 101. Donna Klara. — 102. Liriko. — 103. En restoracio. — 104. El popo-

laj melodioj. — 105. Fatala amo. — 106. L'amo de geblin-
duloj. — 107. Pjotr Plorulin. — 108. Epistolo sentimentala.
109. La deziro. — 110. Alpa Violo. — 111. La kunhelpa-
do. — 112. En labirinto de l'amo.

La sekretario, JOAN GILI NORTA

KANTO

Knabino dormas sub betul'
sur mola herbolit';
vagante vidas ŝin junul',
alvenas kun hezit'
Jen kantas birdo en la nest';
joho, joholdriho,
por koro estas amo fest',
joholdriholdriho!

La vangoj ruĝaj kaj la buŝ'
de l'ĉarma belulin!
la bukraj haroj al ektuŝ'
invitas loge lin;
sed kantas birdo en la nest':
joho, joholdriho,
por koro estas amo fest',
joholdriholdriho!

Malgranda iĝas lia kor'
sed granda l'emoci';
li fine kison ŝtelas for
de l'lipoj sen konsci';
dum kantas birdo en la nest';
joho, joholdriho,
por koro estas amo fest',
joholdriholdriho!

Denove vagas la junul'
ridante pro l'hezit',
dum dolĉe revas sub betul'.
knabin', sur herbolit'.
Kaj kantas birdo en la nest':
joho, joholdriho,
por koro estas amo fest',
joholdriholdriho!

JULIUS KARNAS

Sankta Francisko kaj la lupo

Kiam Sankta Francisko ĉeestis en la urbo Gubbio, aperis en la lando monstra lupo, terura kaj feroĉa, kiu ne nur manĝis bestojn, sed ankaŭ homojn. Tial ĉiuj burĝoj timis, ĉar ĝi ofte proksimiĝis preskaŭ ĝis la urbo, kaj ĉiuj portis armilojn, forirante el la urbo, kvazaŭ ili iras al batalo. Spite ĉion, neniu, kiu renkontis la lupon, kapablis defendi sin kontraŭ ĝi, kaj la timo pri tiu lupu estis tiom granda, ke neniu plu riskis, forlasi la urbon.

Jen, Sankta Francisko kompatis la urbanojn, kaj li decidis, iri al tiu lupu, kvankam oni avertis lin.

Li faris la kruc-signon kaj iris kun siaj kunuloj el la urbo kaj konfidis ĉion al Dio. Kaj ĉar la aliaj ne kuraĝis plueniri, Francisko tute sola direktis sin al tiu regiono, kie la lupu regaĉis.

Kaj jen la fenomeno! En ĉeesto de multaj burĝoj, kiuj estis alvenintaj, por vidi tiun miraklon, tiu lupu ekkuregis, la buŝegon malfermitan, al Sankta Francisko; kaj kiam ĝi proksimiĝis al li, Sankta Francisko faris la kruc-signon super ĝi, vokis ĝin al si kaj diris al ĝi la jenon: «Venu al mi, frato lupu! Mi ordonas al vi en nomo de Kristo, fari nenian malbonon nek al mi, nek al iu ajn.» Kaj mirinde! Apenaŭ Sankta Francisko faris la kruc-signon, la terura lupu fermis sian buŝegon kaj ekhaltis; kaj kiam Sankta Francisko estis dirinta sian ordonon, ĝi mildece alproksimiĝis, kvazaŭ ŝafido, kaj sin kuŝigis ĉe la piedoj de Sankta Francisko. Nun la sanktulo parolis al ĝi la jenon: «Frato lupu, vi multe malutilas en tiu regiono kaj faris grandajn krimojn, difektante kaj mortigante senpermeso la kreitaĵojn de Dio. Kaj vi mortigis kaj manĝis ne nur bestojn, ja vi eĉ kuraĝis, murdi homojn, kiuj estas kreitaj simile al la Diable. Pri tio vi meritas la pendumilon kiel ŝtelisto kaj danĝera murdisto. Kaj ĉiuj en la ĉirkaŭaĵo krias kontraŭ vi kaj grumbas pri vi, kaj tiu tuta lando estas malfavora al vi. Sed mi volas, frato lupu, pacigi inter tiuj kaj vi, por ke vi ne plu suferigu ilin, kaj ke ili ankaŭ pardonu al vi ĉiujn faritajn krimojn, kaj ke nek homoj, nek hundoj persekutu vin.» Post tiaj paroloj la lupu ekvostumis kaj ekkonigis per gestoj de l' korpo kaj de l' okuloj kaj per kapjeso, ke li volas akcepti kaj respekti la kontrakton, kiun Sankta Francisko proponis al li.

Ree ekparolis Sankta Francisko: «Frato lupu, ĉar vi

konsentas, daŭre pacigi, mi promesas al vi, ĉiam tiel longe kiel vi vivos, havigi al vi nutron, tiamaniere, ke vi ne plu suferos pri malsato; ĉar mi ja bone scias, ke vi flaris ĉiujn malbonojn pro malsato. Sed, ĉar mi akiris por vi tiun favoron, mi deziras, frato lupo, ke vi promesu al mi, neniam suferigi iun ajn homon aŭ beston; ĉu vi tion promesas al mi? »

Kaj la lupo per kapjeso sciigis, ke li tion promesis. Sankta Francisko diris nun: «Frato lupo, mi deziras, ke vi donu pro tiu promeso vian certigon al mi kiel garantiaĵon, por ke mi povu certe fidi vin». Kaj la sanktulo etendis sian manon, por akcepti la garantiaĵon de ĝia fideleco, kaj la lupo rekte alten levis sian piedegon kaj metis ĝin fideme en la manon de Sankta Francisko. Tiamaniere la besto donis al li la signon de fideleco, tiel bone, kiel ĝi povis.

Nun diris la sanktulo: «Frato lupo, en la nomo de Jesuo Kristo mi ordonas al vi, kuniri kun mi sentime! kaj ni iru, por sigeli tiun pacon en nomo de Dio». Kaj la lupo iris kun li, obeeme kiel milda ŝafido.

Vidinte tion, la burĝoj tre miris kaj tuj oni sciis tion en la tuta urbo. Ĉiuj homoj, geviroj, grandaj kaj malgrandaj, junaj kaj maljunaj amase direktis sin sur la placon, por vidi la lupon kun Sankta Francisko. Kiam la tuta popolo estis kunveninta, Sankta Francisko levigis, por prediki al ili, kaj li diris al ili interalie ankaŭ, ke Dio allasas tiajn aferojn kaj suferojn pro la pekuloj, kaj ke la infera fajro, kiu eterne daŭros por la kondamnitaj, estas multe pli terura ol la furiozo de la lupo, kiu kapablas murdi nur la korpon. Kiom ni devas timi la inferan buŝegon, se la buŝego de malgranda besto jam timigas kaj tremigas tiom da homoj! «Turnu vin do, karuloj, al Dio kaj pentofaru pro viaj pekoj, tiam Dio liberigos vin en tiu vivo de la lupo kaj en la estonta vivo de la infera fajro».

Fininte la predikon, Sankta Francisko diris: «Aŭskultu vi, karaj fratoj: Frato lupo, kiu staras antaŭ vi, promesis al mi, kaj per manbato garantiis, pacigi kun vi kaj neniam suferigi vin. Nun vi devas promesi al li, doni al li en ĉiu tago, kion li necesas. Kaj mi garantias por li, ke li fidele respektos la pacon».

Unuvoĉe la tuta popolo promesis, nutri lin. Sankta Francisko nun diris antaŭ ĉiuj al la lupo: «Kaj vi, frato lupo, ĉu vi promesas al tiuj ĉi, plenumi la packontrakton, ke vi suferigu nenion, nek la homojn, nek la bestojn, nek iun ajn kreitaĵon?» Kaj la lupo genuigis kaj klinis la kapon; kaj

per afablaj gestoj de l' korpo kaj de l' vosto kaj de la oreloj ĝi montris, kiel eble plej bone, ke ĝi volas plenumi ĉiun kondiĉon de ili postulita. Nun diris la sanktulo: «Frato lupo! kiel vi antaŭ la pordego donis vian certigon por garantiĝi tiun promeson, mi ankaŭ deziras, ke vi sammaniere antaŭ la tuta popolo donu garantion de fideleco, por ke vi ne malkontentigu min, post kiam mi por vi garantiis». Jen la lupo levis la piedegon kaj metis ĝin en la manon de l' sanktulo.

Pro tiu okazaĵo regis en la popolo tia ĝojo kaj tia miro pri la interpaciĝo de la lupo, ke ĉiuj vokis al la ĉielo kaj eklaŭdegis kaj gloregis Dion, kiu sendis al ili Sanktan Franciskon por ke li pro siaj meritoj liberigis ilin de l' buŝego de la feroca besto.

Poste tiu lupo vivis ankoraŭ du jarojn en Gubbio; kaj ĝi frekventis tute familiare la domojn de pordo al pordo, ne farante molbonon al iu ajn, kaj ne spertante mem suferojn de la aliaj; kaj ĝi estis volonte nutrita de la geĥomoj; ankaŭ dum ĝi trairis la lokon de domo al domo, bojis neniu hundo post ĝi. Fine post du jaroj frato lupo mortis pro maljuneca malforto; kaj la urbanoj estis tre malgajaj pri tio: ĉar, vidinte lin tiom milda, iranta tra la urbo, ili pli bone povis rememori la virtecon kaj la sanktecon de Sankta Francisko.

MARIA SCHÖTTL

Premiita en Vendrell.

BIBLIOGRAFIO

Hungara antologio. — Redaktis: K. Kalocsay. Kunlaboris: J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche. Enkondukon verkis Miliaelo Babits. Poemoj kaj noveloj de 50 hungaraj verkistoj. Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, Budapest, IX. Mester-u. 53. Formato 15 × 23 cm. 472 tekstopaĝoj kaj 24 kliŝopaĝoj kun la fotoj de 47 verkistoj. Senligna papero, multkolora kovrilo. Prezo svisaj frankoj 12.—broŝurita; sv. fr. 14.—bindita. Aldonu 10% por sendkosto.

Majstra verko, dividita en du partoj: poezio kaj prozo. Bonaj traduko kaj eldono. Sed ni ne ŝatas tiun disigon de prozo kaj poezio. Bedaŭrinde, la studo pri la hungara literaturo ne estas verkita originale en Esperanto, sed tradukita el franca

lingvo, kaj la notoj pri la prezentataj aŭtoroj estas tro nesufiĉaj.

Tamen la valoro de la literaturaĵoj, kiujn prezentas al ni «Hungara Antologio», estas nekalkulebla. Kaj oni devas pensi, ke, krom la pecoj enhavataj de tiu hungara antologio, estas jam aperintaj en libra formo multaj aliaj hungaraj literaturaĵoj. Do la hungaraj amikoj estas nepre la plej laboremaj sur literatura kampo kaj rajte ili vivigas nian literaturan organon «Literatura Mondo». Ni postulus nur iom malpli da emo al la neologismoj, eĉ se ili montriĝas kelkafoje tre necesaj por la literatura lingvo.

El la poezia parto, kies aranĝo certe devigis la plej grandan laboron, ni aparte ŝatas: Malkuraĝulo (popola balado), Vanitatum vanitas, Fea sonĝo, Ho teda pens', La poetoj de la XXa jarcento, Valo kaj monto. Kial kantas vi, poetoj bonaj? Je la fino de la jaro, La kimraj bardoj, La morto de Pan, Fajroj, Dorsoj.

Ĉiuj kunlaborintoj en la Hungara Antologio estas tre talentaj, sed ni devas ĉefe admiri, unu fojon ankoraŭ, niajn amikojn Kalocsay, Baghy kaj Szilágyi.

Pola Folkloro kaj Popolkanto, de S. Grenkamp, kun 10 melodioj kaj 8 ilustraĵoj ekstertekste. Eldonis: Universala Esperanto Asocio, Genève, 1934.

Broŝuro 64-paĝa, kun bonegaj papero, preso kaj ilustraĵoj. Ne malpli bonaj la versaj tradukaĵoj kaj la tuta prezentado de la temo. La pola folkloro kaj popolkanto certe estas unu el la plej interesaj, kaj la pola Esperanto-verkisto S. Grenkamp estas, krom unu el la plej laboremaj, unu el la plej korektaj kaj elegantaj.

La ekstera aspekto de la libreto estas ankaŭ aparte alloga kaj montras ke ĝi aperis el la «Centra Presejo Esperantista», de V. Polgar.

Amelia kaj Marina, Amatora Poezio, originale Esperante verkita de Julio Mangada Rosenorn, Madrid, 1934.

Luksa volumo, 168-paĝa, per kiu ni konatiĝas kun la intima vivo de la aŭtoro. Eĉ se la enhavo ne ĉiam estas plene korekta el lingva kaj arta vidpunktoj — amiko Mangada mem kvalifikas amatora sian poezion —, tiu verko prezentas al ni kelkajn interesajn poemojn. Kaj oni ofte sentas grandan simpatian al la verkinto, sciigante pri liaj ĉagrenoj, kaj oni kondolencas kun li pro la morto de liaj du filinoj — unu sin mortiginta —, belaj kaj noblaspektaj laŭ la portretoj troviĝantaj

en la libro. Kortuŝaj estas la esprimoj de Mangada, ili rememorigas pri la simila tragedio de la kataluna poeto Joan Alcover kaj lia ĉagreno en «Desolació».

Rimarkindaj estas ankaŭ, eĉ en sia sincera naiveco, poemoj kaj desegnaĵoj faritaj de Kolonelo Mangada dum li estis en malliberejo pro politikaj kaŭzoj. Li estis arestata pro tro vigla defendo de deputitoj, poste en decembro 1930 pro la okazintaĵoj en Jaca antaŭpreparintaj la Hispanan Respublikon. Nia amiko Mangada estas fervora esperantisto, bona republikano kaj liberpensulo, homo romantika, vera Don Kihoto... — J. G. C.

* * *

Alvoko. — Marista Ligo Esperantista, kiu celas disvastigon de Esperanto inter la maristoj kaj samprofesianoj, serĉas delegitojn en tiuj havenurboj, kie ni ankoraŭ ne estas reprezentataj.

La tasko de la delegito estas; Viziti la diverslandajn ŝipojn kaj inter la maristoj disdoni propagandilojn pri Esperanto. (La propagandiloj estas en diversaj lingvoj kaj ni sendas tiajn al la del.) Propagandado inter la maristoj estas tre grava por la tuta esperanta movado. Ĉis nun ni esperantistoj ne sufiĉe atentis tion.

Post nur mallonga agadtempo M. L. E. konstatis grandan sukceson en sia laboro, sed por ke ni efektive venku estas necese, ke ni estu reprezentataj en ĉiu havenurbo de unu aŭ pluraj delegitoj. Ĉiu vera esperantisto komprenu la gravecon de propagandado inter la maristoj. Ĉiu esperantisto lerta aŭ mallerta, povas helpi nin en nia laboro. Samideanoj, kiuj ne havas tempon por delegita laboro povas helpi per aliĝo al M. L. E. La membrokotizojn ni uzas en la propaganda laboro.

La kotizoj de M. L. E. estas:

Pasiva membro, 1 svisa franko.

Aktiva membro, 2 svisaj frankoj.

Subtenanta membro, 10 svisaj frankoj.

Grupo pagas minimume 2¹/₂ frankojn.

Konigu la enhavon de nia artikolo al viaj amikoj kaj klubanoj kaj instigu ilin aliĝi al M. L. E.

Sendu jam hodiaŭ viajn aliĝon kaj kotizon al Marista Ligo Esperantista, Villa Skogbacka, KVICKSUND, SVEDUJO. Sekr. Holger Ekblad.

Sveda poŝtĝirokonto, 90226.

ENLANDA MOVADO

Barcelona. — La Societo Paco kaj Amo elektis la jenan gvidantaron por 1935: Eŝtanislau Gabarrò, prezidanto; Xavier Nagore, vicprezidanto; Domènec Massachs, sekretario; Joan Roiget, vicsekretario; Antoni Francès, bibliotekisto; Evarist Lapeira, kasisto; Ricard Alberich, kalkulisto; Jesús Roca, Joan Basas, Josep Artolà kaj Pere Naranjo, voĉdonantoj.

La sama societo komencis grandan propagandon en sia kvartalo kun la celo altiri al esperanto ĉiujn kulturajn grupojn kaj komenci grandiozan kurson. La entrepreno ŝajne havos kontentigan sukceson.

— La Bulteno de Esp. Societo Nova Sento, februara numero, publikigis tre allogan artikolon pri la XVII Esperanto-Kongreso en Ripoll.

La nova komitato konsistas el la sekvantaj samideanoj: Manuel Peris, prezidanto; Enric Gili, vicprezidanto; Antoni Boronat, sekretario; Francesc Giménez, vicsekretario; Ricard Burgada, kasisto; Josep Esteller, kalkulisto; Ramon Puntí, bibliotekisto; Josep Banet, Simó Masip, Josep Navarro kaj Francesc Gili, voĉdonantoj.

— La Proleta Grupo Juneco anoncas novan kurson por la 11-a de marto.

— La Grupo Barcelona Stelo transloĝiĝis al strato Aurora, 12. La kunvenoj okazas ĉiulunde kaj ĵaŭde. Ni esperas, ke la malnova grupo en la nova loĝloko disvolviĝos pli facile kaj retrovos sian iaman viclecon.

Terrassa. — Nia malnova amiko Sebastià Chaler, kies entuziasmo estas ĉiam freŝa, estis honorata de la membroj de «Lumon» per intima festeto en kiu oni reliefigis lian grandan taskon por la grupo kaj por Esperanto. Nian gratulon al la pioniro.

Manresa. — La 11-an de februaro komenciĝis nova kurso en la sidejo de Liceu Dalmau sub la aranĝo de la grupo «Bela Espero». Partoprenas 19 lernantoj.

Vic. — En tre videbla loko, sur la fasado de la vendejo, kiun posedas en tre frekventata strato en Vic nia malnova samideano S-ro. Josep Comas, oni vidas nun la esperantan simbolon, grandformatan verdan stelon sur blanka fono, kiu sendube vokos la atenton de ĉiu trapasanta samideano. Ni gra-

tulas nian amikon, kiu tiel trafe montras publike la insignon de nia nobla idealo. Jen imitinda ekzemplo por niaj komercistaj samideanoj.

— La nunjara Komitato de «Esperanta-Grupo» konsistigas S-roj. Josep Pratdesaba, prezidanto; Jacint Comella, vicprezidanto; Lluís Pous, sekretario; F-ino. Lluïsa Castells, vicsekretariino; S-roj. Joan Conill, kasisto; Miquel Parareda, kalkulisto; F-ino. Montserrat Cinca, bibliotekistino; sinjoroj Josep Serarols, Josep Salat, Tomàs Tónico kaj Pau Blanch, voĉdonantoj.

— Fine de februaro edziĝis nia grupano urbestro de Vic, Sro. Joan Traveria, kun F-ino. Elvira de Mas. Niajn gratulojn al la felîca paro.

NIA 27.^a: ĈU NURA FESTO?

Entuziasmajn, laŭdajn aprobojn jam vekis tra tuta Eŭropo la provizora programo de nia 27-a Universala Kongreso, kaj de la ampleksa turisma organizo kun ĝi kunligita: «mirinda», «rava», «alloga», «grandioza»: jen la vortoj, kiujn oni ĉerpas ĉiutage el la leteroj de la itala kaj eksterlanda samideanaroj.

La Organita Komitato tre fervore kaj precize zorgos eĉ la plej malgrandajn detalojn, por ke la realo superu ĉies dezirojn; por tio ĝi sin turnas al la tutmondaj Esperantistaj Asocioj kaj Institucioj, petante ke ili tre atente konsideru la jenan varmegan peton.

Universala Kongreso de Esperanto estas tradicia jara festo de la tutmonda Esperantistaro, kaj ankaŭ dum nia 27-a amikoj-samideanoj festos kiel eble plej brile; sed ĝi ne povos, ĝi ne devos esti nura festo!

Ĝi estu solena pruvo de la aktuala tutmonda disvastigo de Esperanto, ĝi estu signifoplena mejloŝtono en la historio de la movado, ĝi estu venka batalo kaŭzanta novan orientigon de l' publika opinio, ĝi estu grandioza manifestacio dononta gravajn sekvojn en la kampoj de la universala esperantista movado kaj de la praktikaj aplikadoj de nia mondhelplingvo.

La aliĝoj de kelkaj miloj de privataj kongresanoj tute ne sufiĉus por atingi tiajn celojn: estas nepre necesa grandskala aliĝado de Asocioj kaj Institu-

cioj — ĉu esperantistaj ĉu ne esperantistaj —, de Lernejoj, de komercaj kaj industriaj Societoj, Firmoj, Federacioj, Grupoj, Entreprenoj, Bankoj, Turismaj kaj alispecaj Agentejoj, Foiroj, Fakaj rondoj, Gazetoj, k. t. p.; jen serioza kaj nekontraŭstarebla pruvo je efektiva internacia volo kaj forta internacia voko: vere amasa, impona, laŭta postulo el ĉiuj fakoj kaj landoj, kvazaŭ « unuanima voĉdonado » por Esperanto!

Ĉiu, senescepte, tuj eklaboru por varbi inter la diritaj Institucioj kiel eble plej grandan nombron da aliĝoj de « Helpkongresanoj » (speciala kotizo « D », italaj liroj 40.-): unuaj aliĝantoj estu la Esperantistaj Landaj kaj Fakaj Societoj kaj Grupoj ĉar la ekzemplo estas ja la plej taŭga instigilo!

Nia 27-a en Roma havos gravegajn sekvojn por la tuta esperantista movado, nur se ĉiuj (Esperantistaj Federacioj, Asocioj, Institutoj, Gazetoj, Grupoj, izolaj gesamideanoj, simpatiantoj, k. t. p.) en ĉiu lando kaj urbo kaj urbetto de l' mondo, sentos sian respondecon kaj ĝuste taksos la eksterordinaran gravecon de l' nuna momento; nur se ĉiuj sentos la devon kunlabori, jam de nun, tre energie kaj senhalte, por tia plua paŝo al la triumfo de l' genia Verko de Zamenhof!

Tia solena « unuanima voĉdonado » esperantista en Roma certe altiros la atenton de la Itala Registaro, kaj, pro ties granda influo, ĝi fine vekos la intereson de la tuta mondo.

La varblaboro farota estas iel simila al la preparaj laboroj por la Konferencoj de Venecio (1923), Parizo (1925), kaj Vieno (1934), por la aplikado de Esperanto en specialaj fakoj; sed nekompareble pli grandskala. La favoraj sekvoj de tiuj Konferencoj montriĝis post multaj jaroj; ni devas klopodi por atingi, okaze de la Roma Kongreso, similan sed multe pli vastan rezulton per nombro kaj graveco de aliĝoj.

Per kunigitaj fortoj de ĉiuj samideanoj kaj per entuziasma penado, ni povos certigi al nia 27-a tian sukceson, ke la Roma Kongreso indiku neforgeseblan daton en la historio de la homa progreso.

La promesplena devizo de la Esperantistaro estu: « ROMA 1935 »!

LA ORGANIZA KOMITATO

de la 27-a Universala Kongreso de Esperanto

La 20-an de februaro en Lausanne, Svislando, mortis sinjoro Julius Karnas, redaktoro de la Esp. organo «Flandra Esperantisto».

Naskiĝinte en Berchem, apud Antwerpen, Belgujo, en la jaro 1902, li iĝis instruisto en 1920 kaj samtempe esperantistiĝis. Baldaŭ li gvidis kursojn, unue por la grupo «La Verda Stelo», poste, sub la aŭspicioj de la «Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato», vesperajn kursojn en komunumaj lernejoj. Li tradukis multajn flandrajn kantojn esperantlingven kaj verkis ankaŭ originalajn versojn. En 1930 li kompilis «Kantaro Esperantista» multŝatata de la flandraj kaj nederlandaj Esperantistoj. En la sama jaro okazis la 1-a Kongreso de Flandraj Esperantistoj, de kiu li estis la prezidanto. Post tiu okazintaĵo la terura pulma tuberkolozo lin ekkaptis. Li devis cedi la plenumon de sia profesia tasko kaj vane serĉis resaniĝon en la arbaroj de sia regiono. En 1933 li vojaĝis Svislandon kaj restis tie pli longe ol unu jaron. Dum lia restado tiea li daŭrigis sian Esp. laboron kaj estis premiita de la «Floraj Ludoj».

Reveninte hejmen li prenis sur sin la taskon de redaktoro de «Flandra Esperantisto», sed en novembro 1934 li denove devis vojaĝi Svislandon.

Kiel eble plej bone li klopodis plenumi siajn redaktorajn devojn, ĝis fine li mortis.

Laŭ lia deziro la enterigo okazis en lia naskiĝloko la 26-an de februaro. Li postlasas vidvinon kun sepjara fileto.

Li fosis sian sulkon kaj semis konstante...

A. LODEMA

— Kun tiu ĉi numero ni sendas al niaj abonantoj propagandan prospekton de la Universala Ekspozicio de Bruxelles. Por pliaj ekzempleroj kaj propagandiloj oni turnu sin al Exposition Universelle de Bruxelles, 51, Avenue des Arts, Bruxelles (Belgujo).